Kurso pri verkado en Esperanto

**Instruisto: Trevor Steele**

# Leciono 01

[1] Estas nia privilegio ...

[2] Nepre mem legu. Bona libro povas inspiri. Ankaŭ malbona!

[3] Vi volas verki. Ĉu vi havas ion dirindan? Ĉu gravas?

[4] Ĉu faklibro (historio) aŭ fikcio? Fikcio = konversacio inter verkinto kaj leganto.

[5] Kia ĝenro: teatraĵo? Romano? Novelo?

[6] Kia rakontmaniero? "Okulo-de-Dio"? Unuapersona (do limigita perspektivo)?

[7] Kelkaj propraj spertoj (el *Estrino* kaj *Feliĉan Kristnaskon*)

[8] Kiu tenso? *Ŝi hezite malfermis la pordon ... Ŝi hezite malfermas la pordon ... Ŝi hezite malfermos la pordon ...*

[9] Ĉu viro povas prezenti el virina perspektivo, kaj inverse?

[10] ***Iam ie viro iris/iras/iros laŭ vojo, pensante. Survoje li vidis/vidas/vidos Li decidis alparoli ŝin / Ŝi decidis alparoli lin. Ŝi respondis iom hezite.***
Ni metu karnon sur la skeleton! Eble inversigu viron kaj virinon.

Verku!

**Estrino**

La forta voĉo de lipharara s-ro Jones, kiu parolis kvazaŭ serĝento muĝanta trans soldatan trejnkvadraton kontraŭ ventego, tratranĉis ĉiun flustrokonversacion: "Silentu! Estrino Grimsby venas!" li bojegis per la mikrofono, eble forgesinte, ke la aparato per si mem tre laŭtigas la homan voĉon.

Kaj efektive la peza ligna pordo knare malfermiĝis, tiu, kiun nur Estrino uzas. Ĉiu lipoparo, kiu esperis aldoni kelkajn lastajn silabojn al kaŝa konversacio, tamen zipiĝis. Nun la sola bruo estis la susuro de kvincent dudek knabinaj uniformoj kaj de kvardek kvin instruistaj talaroj, unumove obeante la levogeston de s-ro Jones kaj ekstarante por honori la proksimiĝon de Sinjorino.

*Kara Majstro, sŭami Nantanda, jen mia provo plenumi la ekzercon skribi, kiel vi postulis, eseon kun la titolo* Kiel viaj proksimuloj vidas vin. *Mi supozas, ke la elekto de la sceno estas memkomprenebla, ĉar tie laŭvorte* ĉiuj *vidas min. Konfesende mi pli ĝuis prezenti kolegojn ol min mem, kaj tio iom dubigas min, ĉu la ekzerco multon kontribuas al mia spirita progreso. Viaj komentoj kompreneble tre interesos min.*

*Eleanora Grimsby*

## Feliĉan Kristnaskon

Ĉie pendis bildoj de hedero kaj sonoriloj, kaj kompreneble tiu dikventra ruĝvesta sinjoro, la ludilportanto, la simbolo de komercista Kristnasko.

*Kristnasko? Io por infanoj, kaj poste por vendistoj. Deviga aĉetado. Por mi sensignifa.*

“Bonan matenon, Adam. Feliĉan Kristnaskon.”

“E ...  saluton al vi, Maria. Same al vi.”

“S’lut’, Adam nia prapatro.”

“Saluton al vi, Henry, heredinto de la prapeko. Kaj al vi, Tom. Feliĉan Kristnaskon.”

“Matenon,  Adam.”

Kristnaskaj kantoj elgurdiĝis.

*Stranga raso, ni homoj. Ni ĉiam devas ion diri aŭ aŭskulti, ĉu sencohavan aŭ ne. Sed, nu, ni havas eĉ pli malbelaj emojn ...*

La kvazaŭa danco de korpoj hastantaj tien kaj reen laŭ koridoroj estis alia matena rito. Adam salutis ankoraŭ kvar-kvin kolegojn, kaj preskaŭ preteriris la grandan komunan ĉambron.

*Ĉu kontroli mian poŝtfakon? Apenaŭ penvaloras, ĉio venas nuntempe per reto.*

Tamen li eniris kaj vidis de malproksime, ke en lia faketo kuŝas slipo. Necesis saluti survoje ankoraŭ kelkajn, sed li pensadis: *Kio povus esti tiu slipo?*

Li enmanigis la falditan slipon kaj legis la netan manskribaĵon: Adam, bv. veni en mian ĉambron je 14,30h. Demian.